


ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ syyskuu ♦ septembro ♦ 4/2007



Arta Lumo, p. 5-7

La kantelisto Timo Väinänen kaj dancistino Päivi Järvinen fascinis la publikon per sia spektaklo Vizaĝoj por kiu estis preparita nova ero, fajrovoka ĉantado en Esperanto: "Ukko la plej alta dio, granda kiu kreis ĉion, faru fortan fulman fajron, kaj enŝovu la fajreron."
(Fotisto: Ilari Ikävalko)

Simpozio kaj Autŭnaj Tagoj, p. 19-26

Someraj okazoj: Valamo, p. 8 ♦ BET, p. 11 ♦ UK, p. 12
Anja Karkiainen gajnis, p. 18 ♦ Kuopio-broŝuro en Esperanto, p. 26

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eaflehti@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ mmakita@utu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 050 365 0037 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Anna Ritamäki*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 18 e/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 12 e.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Anna Ritamäki*

Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ✉ (02) 423 246 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

tuomo.grundstrom

Tuomo Grundström, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ @lailanet.fi

Börje Eriksson, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. ☎ (03) 785 1191 ✉ esperarto@phnet.fi

Taneli Huuskonen, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli@poczta.onet.pl

Jukka Laaksonen, Orimuskatu 79 B 4, 33580 Tampere. ☎ (03) 2554 724 ✉ jvaletto@kolumbus.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Mira Anonen, Karstulantie 8 E 70, 00550 Helsinki. ☎ 040 759 2184 ✉ mira.anonen@helsinki.fi

Olli Pajula, Salamakuja 4 as 2, 90420 Oulu. ☎ 050 571 9224 ✉ olli.pajula@baanamail.fi

Timo Pirinen, Rinnetie 11-13 D 32, 06650 Hamari. ☎ 040 592 1756 ✉ timo.pirinen@gmail.com

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): Sampo 800017-230825.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Internet: <http://www.esperanto.fi>





Interfekundiĝoj de lingvaj interesoj

Esperanto forte logis en 1986, kiam min al eklerno instigis artikolo en la svedlingva skolta gazeto Scoutposten. Lingvoj min jam pli frue logis al diskutoj kaj agado. Esperanto donis al tiu intereso pliajn dimensiojn. Esperanto multflankigis mian lingvan intereson same kiel miaj spertoj en aliaj kampoj riĉigis mian komprenon pri Esperantujo.

Mia patrinaflanka familio estas delonge aktiva en la Sveda popolpartio. Mia avo estis iam prezidanto de la komunuma estraro en Kimito. Mi ankaŭ junule aliĝis al la junulara sekcio kaj daŭre estas membro, ne tre aktiva ĉar kiel ĵurnalistino mi volis laŭeble teni eksteran vidpunkton al la lokaj politikaj okazaĵoj. Tamen en Svenska Finlands folkting, la asembleo de svedlingvanoj mi volonte ekaktiviĝis. Mi nun estas membro por la dua periodo.

La 75-persona asembleo kunsidas unufoje jare, la estraro, laborkomisiono kaj prezidantaro pli ofte. La asembleo reprezentas sep partiojn kaj aldone havas 5 reprezentantojn de Alando, kie ekzistas aparta partia sistemo. La Alanda parlamento elektas la reprezentantojn de la memrega, svedlingva regiono. La ceteraj estas nerekte elektitaj surbaze de la rezultoj akiritaj de svedlingvaj kandidatoj en la komunumaj elektoj. La nereakta sistemo, kiu estas maniero dividi la mandatojn inter la partioj, estiĝis grandparte pro la malkontento de la svedlingvaj socialdemokratoj, kiuj ne sukcesis bone reprezentiĝi en la antaŭa rekta elektosistemo. Ankaŭ en la nuntempa asembleo la Sveda popolpartio havas

grandan majoritaton kun 50 anoj.


Folktinget ekde sia naskiĝo en 1919 ambicias reprezenti la svedlingvanaron de Finnlando, sed agad- kaj elektomanieroj variis. En iuj periodoj Folktinget ne aktivis dum en aliaj la aktiveco preskaŭ tute ne ricevis atenton. Inter ĝiaj ĉefaj roloj troviĝas la respondoj al prijuĝigoj pri planataj ŝtataj reformoj. Dum la prezidanta periodo de Henrik Lax 1993-2005 Folktinget alprenis pli videblan rolon kaj ricevis leĝe priskribitan statuson. Malgraŭ la plia videbleco la organizaĵo restas relative nekonata – ankaŭ inter svedlingvanoj.

Ulla-Maj Wideroos elektiĝis en aprilo prezidanto. Samtage ŝi konsentis veni al nia simpozio. Ŝi estas konata politikisto. En la antaŭa registaro ŝi estis dua ministro pri financoj. Dum la nuna parlamenta periodo ŝi gvidas la Svedan parlamentan grupon (konsistas el la anoj de la Sveda popolpartio kaj la reprezentanto de Alando).

Ekde 2003, kiam realiĝis pasintfoje la decido pri lingva statuso de la komunumoj kaj administraj unuoj de Finnlando, ŝia loĝurbo Närpes (finne Närpiö), estas unu el nur tri svedlingvaj komunumoj ekster Alando. La aliaj du estas Korsnäs kaj Larsmo (Luoto). Je la pasintfoja konstato de la lingvaj statusoj Maxmo (Maksamaa) kaj Houtskär (Houtskari) dulingviĝis kaj Sibbo iĝis Sipoo laŭ sia majoritata lingvo.

Mi esperas ke la simpozio kontribuos al plia interfekundiĝo inter spertoj de esperantistoj kaj aliaj kun lingvaj interesoj.

Anna Ritamäki



Municipa administracio en forta reformo

La lokan administracian strukturon de Finnlando en venontaj jaroj skuos municipa reformo. La ŝtato volas kunigi malgran-

dajn municipojn por produkti municipajn servojn pli kostoeffike. Oni difinis, ke 20 000 loĝantoj estu la dezirata grandeco de la unuo, kiu produktas la servojn – ne nepre municipoj de 20000 loĝantoj, ĉar la servoproduktanto povas esti ankaŭ grupo de kelkaj municipoj. Ĉiukaze estas jam certe, ke el la ĉ. 430 nunaj municipoj de Finnlando almenaŭ pluraj dekoj, eventuale eĉ pli ol duono kuniĝos kun aliaj.

La municipa reformo enhavas trajtojn, kiujn mi tre malŝatas, ĉefe pro efikoj en loĝkomunuman kaj trafikkomunuman strukturon, funkciaĉion de loka demokratio kaj tradicion pri lokaj nomoj, sed en tiu ĉi artikolo mi traktas nur ĝian lingvan aspekton. Ĝenerale mi konstatas nur, ke laŭ mia sperto subitaj unufojaj reformoj malbonas ĉiam, oni devus lasi aferojn evolui laŭ siaj propraj spuroj.

Finnlando estas laŭ konstitucio dulingva ŝtato, kun oficialaj lingvoj la finna kaj la sveda. La municipoj dividiĝas al unulingvaj (estas kaj finnlingve kaj svedlingve unulingvaj) kaj dulingvaj – municipo estas dulingva, se pli ol 8 procentoj el la loĝantaro, aŭ pli ol 3000 loĝantoj, parolas la minoritatan lingvon. La regulo tamen koncernas nur la finnan kaj la svedan lingvon – pli ol 3000 rusoj loĝantaj en finna municipo ne faras la municipon dulingva.

La sveda lingvo en Finnlando estas en sindefenda pozicio. La nombro da svedlingvanoj iom post iom malkreskas kaj multaj regionoj, kiuj iam estis svedlingvaj, estas nun survoje al finnlingva majoritateco. La municipa reformo

metas al kelkaj lokoj novan defion: Ĉu la svedlingvaj regionoj serĉu kunlaboron inter si, aŭ ĉu ili iĝu partoj de municipoj, kies majoritato estas finnlingva?

Unu speciala kazo estas mia hejmurbo, Turku. Ĝi estas dulingva, sed svedlingvanoj estas nur kelkaj miloj, kaj en praktiko oni ne multe aŭdas la svedan en stratoj de Turku, se oni ne promenas en la kvartaloj najbare de la svedlingva universitato. Ĉiuj najbaraj municipoj de Turku estas unulingve finnlingvaj. La kelkmila svedlingva loĝantaro en Turku tamen garantias, ke ĝi restos dulingva ankaŭ en eventuala kuniĝo kun iuj najbaroj. Do, el vidpunkto de la najbaroj la situacio estas, ke se ili kuniĝos kun Turku, ili subite iĝos parto de dulingva municipo. Tiu estas unu kaŭzo, ke la diskutoj pri kuniĝo de Turku kaj kelkaj ĝiaj najbaroj ĉiam estis problemaj kaj senrezultaj.

En praktiko multaj lokoj en Finnlando estas dulingvaj (aŭ plurlingvaj) koncerne alian lingvon ol la svedan. La plej oftaj en tiu rolo estas la angla kaj la rusa – en kreskanta kvanto ankaŭ en Turku. Ekzemple en la universitatoj estas ofte surmuraj informoj en la angla – kaj ofte vere nur en la angla, tiel ke la sama informo tute ne estas skribita en la finna. Ankaŭ kelkaj vendejoj uzas reklamojn en la angla. Kelkaj vendejoj, eĉ en Turku, ankaŭ metis publikajn informojn en la rusa, sed tre malmultaj faras tion en la sveda. En lokoj kiel Helsinki kaj Lappeenranta la rusa lingvo estas jam ofte uzata.

La dulingveco de Finnlando certe ne estas antaŭ baldaŭa ĉeso – la nombro de svedlingvanoj ne estas en tiom rapida malkresko, ke ili malaperus en la plej baldaŭaj generacioj. Tamen se aferoj evoluos en la nunan direkton, estos baldaŭ levota demando, ĉu ankaŭ ruslingvaj loĝantoj volas al si oficialan statuson en la

Arta Lumo – intimetosa kulturkreado

La festivalo Arta Lumo realiĝis en Kuopio fine de julio en la ideale ekipita muzikcentro kun mirindaj spektakloj, emociaj kaj intelektaj stimuloj. En preĝejo de Puijo nin distris impona organado. En sanchento de Kuopio, gvidite de urba reprezentanto, ni bone manĝis antaŭ la ekskurso. En Vesanto ni spertis antikve novajn instrumentojn kaj la multflankecon de Saliko. En Rautalampi ni saŭnis kaj kune kantis.

Sesdeko ni estis entute, eble iom pli se kalkuli ankaŭ ĉiujn unukoncertulojn, kaj eble ni neniam estis tiom da en sama salono. Nian intiman kulturan etoson kreis ne granda kvanto, sed granda kvalito. Dankon al ĉiuj kunkreantoj, organizantoj kaj artistoj – kaj la publiko alveninta el deko da landoj. Kaj dankon ankaŭ al la personaro de la muzikcentro: Ne nur finance vi estis flekseblaj – en la ĝustan direkton – sed ankaŭ ▷



Fascino pri la kosma pratelefono: Markku Sarastamo, Tiina Oittinen, Tuomo Grundström, Fransüaz, Patrik kaj Sara (Duoble Unu + Unu).

▷ administracio.

Mi ĵus pasigis multan tempon en Rusio kaj vidis, ke multaj rusoj ŝatas Finnlandon kaj revas pri ekloĝado en Finnlando. Multaj trajtoj en la finna tradicio de demokratio kaj organiziteco de

bonfartigaj servoj estas dezirindaj. Pro bonfarto de ĉiuj mi tamen esperas, ke la rusoj sukcesos ankaŭ evoluigi sian propran landon kaj ne ĉiuj nur volos veni al Finnlando.

Mikko Mäkitalo

realige, ĉiam servoprete. Vi provizis la idealajn kondiĉojn!

Sen niaj financoj la festivalo ne estus realigebla: la urbo Kuopio (la broŝuro kaj lunĉo), Pohjois-Savon rahasto (kultura fondaĵo de Norda Savonio, regiona fondaĵo de Suomen kulttuuri-rahasto), Fondumo Esperanto kaj Svenska kulturfonden (svedlingva kultura fondaĵo). Arta Lumo kiittää tuestanne! Tack för ert stöd för kultur på flera språk!

Dankon al ĉiuj artolumigantoj!

*Anna Ritamäki
Prezidanto de EAF*

Arta Lumo Italian lehdistöissä

Arta Lumo -festivaali, joka kesti viisi päivää, oli erittäin monipuolinen tapahtuma, jossa suuri määrä taiteilijoita eri maista esitti esperanton kielellä omia ohjelmanumeroitaan. Myös erilaisia kiinnostavia näyttelyitä ja tutustumiskohteita oli tarjolla yleisölle. Festivaalissa esitettiin myös kuuluisan suomalaisen opettajan ja esperantistin Vilho Setälän filmi "Toiviomatka". Filmi kertoi esperantistien matkasta Italiaan vuonna 1955 kansainväliseen esperantokonferenssiin Bolognaan ja nuorisokonferenssiin L'Aquilaan, Abruzzon alueen pääkaupunkiin. Tämä ohjelman osa herätti Disvastigo-nimisen agentuurin mielenkiinnon.

Disvastigo lähetti tiedon tapahtumasta lehdistölle ja useat päivälehdet julkaisivat artikkelin tapahtumasta, mm. Cronaca D'Abruzzo, jossa oli myös ilmoitus tapahtumasta. Abrozzopress-nimisessä lehdessä oli myös värillinen ilmoitus. Prima da Noi ja Abruzzo Report -lehdet julkaisivat myös uutisen tapahtumasta.

Sanomalehtiagentuuri Disvastigon johtaja Giorgio Bronzetti oli erittäin kiinnostunut Setälän filmistä, koska hän oli L'Aquilan nuorisokonferenssin organisoiija ja halusi siksi osallistua Kuopion tapahtumaan. Hän kommentoi filmiä yleisölle ja kertoi mm. elokuvan kansan-

tanssista, jonka paikalliseen Abruzzon kansallispukuun pukeutuneet tanssijat esittivät kuuluisan lähteen edessä. Lähde on tullut tunnetuksi siksi, että sen reunalla on 99 vesihanaa, joissa on 1200-luvulla kaupungin perustaneiden henkilöiden kasvoveistokset.

Olli Pajula

Arta Lumo en Kaliningrada gazeto

En "Kaliningradskaja Pravda" (11 aŭg 2007), la plej legata tagĵurnalo en la Kaliningrada regiono de Ruslando, aperis mallonga artikolo "Solo en Esperanto". Kaliningrada ĵurnalistino Irina Klimoviĉ rakontis pri la partopreno de Aleksander Korĵenkov kaj Natalja Striĵnjova en la festivalo "Arta Lumo" (Kuopio, Finnlando). Ŝi aparte akcentis, ke en Kuopio Natalja unuafoje prezentis solkoncerton en Esperanto kaj en aliaj lingvoj.

Ĝi estas la dua lastatempa priesperanta artikolo de Irina Klimoviĉ en "Kaliningradskaja Pravda". La 31an de julio sub la titolo "Sen lingvaj baroj" ŝi mallonge prezentis la 43ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (Ŝiauliai, Litovio), en kiuj aktive partoprenis grupo da kaliningradaj esperantistoj. Ĉi tiun artikolon garnas foto de Choe Taesok.

Aleksander Korĵenkov

Lumigo al nia somero

Arta Lumo lumigis nian someron! En belega muzikcentro, ni koncertis sur vasta kaj agrabla scenejo, helpitaj de tre afablaj teknikistoj. Kvakam la publiko ne svarmis, la etoso bonegis! La kulturaj proponoj estis diversaj kaj altkvalitaj, mi aparte ĝojis la koncerton de Dolchamar, en intima ĵazklubejo! Nia finna vojaĝo daŭris reĝe dank' al Onni Kauppinen kiu gastigis nin en sia agrablega bieno. Do, dank' al vi ĉiuj finnaj geesperantistoj, nia unua internacia renkontiĝo estas bonega memoraĵo!

*Fransŭaz Roŝet kaj Patrik Delabi
Kompanio Duoble Unu*

Festivalo

Arta Lumo

esperantotaiteiden lumoa Kuopiossa 27.7.–1.8.2007

La 28.7. klo 13.00 Musiikkikeskus
Festivaalin ja taidenäyttelyn avajaiset
Festivala kaj ekspozicia malfermo

Markku Sarastamon näyttely
Maistaisia festivaalin ohjelmasta
Ohjelma juonnetaan esperantoksi ja suomeksi.
Vapaa pääsy. Tervetuloa!

La 28.7. klo 18.30 Musiikkikeskus
Felicia mondo - Onnen maa
Natalia Strizhnova, Maailmalle iskelmälaulun siivin
esperantoksi, venäjäksi, valkovenäjäksi, englanniksi, ranskaksi ja portugalkiksi.
10 e liput ovelta

La 28.7. klo 22.00 Jazzklubi, musiikkikeskus
Solo
5 e liput ovelta (ikäraja 18)

Su 29.7. klo 19.00, Musiikkikeskus
Vizaĝoj - Kasvot
Timo Väänänen, sähkökantele
Päivi Järvinen, tanssi

Su 29.7. klo 16.00 Puijon kirkko
Esa Toivola improvisoi uruilla
mm. tultujen virsien pohjalta

Su 29.7. klo 22.00, Jazzklubi, musiikkikeskus
Dolchamar
5 e liput ovelta (ikäraja 18)

La 28.7. ennen avajaisia klo 12.00 Musiikkikeskus
Esperanton näyteoppitunti ilmainen!
Atilio Orellana Rojas, maailman tunnetuin esperantonopettaja

Esperantokurssi festivaalin aikana 12 h
27.7. - 31.7. pe klo 17-19, la 8-11 (+ kaikille avoin tunti klo 12),
su-ti 9-11 ja ti 13-15.
Kurssimaksu 40 e
Esperanto-Associo de Finnlando
1997, 2007

www.esperanto.fi
artalumo@esperanto.fi
Järj. Suomen Esperantoliitto

Ilmoittautumiset ja kyselyt:
050 618 0690 (Tuomo Grundström), 050 379 3148 (Anna Riihimäki)
Taustakuva: Kuopion musiikkikeskus, Nanna Hänninen

Tiu ĉi afiŝo aperis sur afiŝtabuloj de Kuopio – kaj ankaŭ kiel ilustraĵo en italaj gazetoj.

Valamo-kurso 23.-27.7.2007

Novuloj, veteranoj kaj eksterlandaj gastoj

En la 8a somera esperantokurso en Popola Instituto de Valamo partoprenis 12 gekursanoj. La kurso estis denove internacia, ĉar du kursanoj venis el Svedio kaj unu el Nederlando. Inter la 9 partoprenantoj el Finnlando estis veteranoj kaj novuloj, tamen ĉiuj jam havis iujn bazajn sciojn pri Esperanto.

Ĉefinstruisto estis Atilio Orellana Rojas kaj kursogvidanto kaj helpinstruisto Tiina Oittinen, sekretario de EAF. La kursanoj dividiĝis en du grupoj laŭ iliaj lingvoscioj: 5 estis en la elementa kaj 7 en la daŭriga. Ili estis instruitaj kaj gviditaj de ambaŭ instruistoj. Ambaŭ grupoj diligente laboris en ĝoja atmosfero. En la daŭriga grupo dum multaj lecionoj estis diskutitaj finnaj kutimoj kaj antaŭjuĝoj pri finnlandoj kaj aliaj nacioj. Pli da spertoj de kursanoj, legu artikolon sendita de unu el ili.

La kursosemajno jam havas proprajn tradiciojn, kiel esperantlingvan rondiradon en la monaĥeja areo: denove lerte ĉiĉeronis Jukka Laaksonen. Ĉar ĉi-jare bone eblis vizito en Valamo antaŭ la festivalo Arta Lumo, Jukka havis vendrede duan ĉiĉeronadon esperante por la 5 vizitantoj. La gastoj, el kiuj 2 venis el Italio, 1 el Germanio, 1 el Francio kaj 1 el Finnlando, alvenis al Valamo jam jaŭde, kiam ili partoprenis la festan Valamo-stilan vespermanĝon kaj ĝuis la programon kune kun la kursanoj.

Aliaj libertempaj programeroj dum la kursosemajno estis promenado al la kruco de la migrantoj kaj vizito al la monaĥeja tombejo. Mercredvespere grupo de kursanoj ekskursis al proksima fumsaŭno ĉe malnova arbarista loĝejo kaj jaŭde kelkaj el ili memstare vizitis la apudan Lintula-monaĥinejon.

Vendrede post la kursofino 10-persona grupo krozadis surŝipe el Heinävesi al Kuopio por tie partopreni la festivalon Arta Lumo. Bonega

vetero akompanis ilin dum la 4-hora vojaĝo tra la belega lagvojo.

Venontjare estos denove tempo reveni al Valamo. La kursosemajno okazos tre verŝajne fine de junio, la tempo estos fiksita plej eble baldaŭ. Ankaŭ 2-taga vizito eblos same kiel ĉi-jare. Atilio kaj Tiina formas la kursoteamon, kiu instruos kaj gvidos vin en la mirinda monaĥeja etoso. Petu pliajn informojn de Tiina aŭ sekvu niajn informojn en Esperantolehti kaj en *www.esperanto.fi*. Bonvenon novaj kaj malnovaj valamanoj!

Valamon kurssi 23.-27.7.2007

– mukana uusia ja vanhoja esperanton ystäviä

Tänäkin kesänä Valamon esperantokurssin tunnelma oli kansainvälinen: 12 kurssilaisesta ulkomaalaisia oli kolme: kaksi Ruotsista ja yksi Hollannista. Pääopettajana oli jälleen argentiinalais-hollantilainen Atilio Orellana Rojas ja kursivastaavana sekä apuopettajana Suomen Esperantoliiton puolesta Tiina Oittinen. Kurssilaiset jakautuivat kahteen ryhmään: 5 alkeisiin ja 7 jatkokurssille; kaikki kuitenkin tiesivät jo jonkin verran etukäteen esperantosta. Molemmat opettajat opettivat ja ohjasivat kumpaakin ryhmää.

Erityisen mukavaa oli nähdä kurssilla esperantoveteraaneja, jotka yli kymmeneen vuoteen eivät olleet osallistuneet tapahtumiin. Toinen ilahduttava huomio oli todeta, että pyörätuolia käyttävät kurssilaisemme pystyivät erinomaisesti liikkumaan Valamon alueella; he pääsivät vaivatta esim. kumpaankin kirkkoon. Kurssikokemuksistaan kirjoitti tähän lehteen esperantoksi Osmo Kaplas, ehkäpä seuraavissa numeroissa voimme lukea muiden kirjoituksia suo-



Starante: Atilio, Marja, Kerstin, Margreet, Tiina, Maisa, Christiane, Soile, Matti, Osmo. Sidante: Matti, Kai, Tyyne. Malantaŭ la fotilo: Börje.

meksi. Kurssikuvassa ovat muut kurssilaiset paitsi kuvan ottanut Börje Eriksson.

Kurssiviikon 25 oppitunnin lisäksi esperantoa oppi myös vapaa-ajan ohjelman aikana: kierto-kävelyllä, retkillä ja illanvietoissa esperanto on pääkieli varsinkin kansainvälisellä kurssilla.

Tänä vuonna kurssiviikon lopulla Valamoon saapui 5 vierailijaa: kaksi heistä Italiasta, muut Saksasta, Ranskasta ja Suomesta. Vierailijat osallistuivat torstai-illan päätösillalliselle ja nauttivat valamolaisen hyvän ruoan lisäksi myös kurssilaisten seurasta ja illan ohjelmasta. Perjantai-aamuna Jukka Laaksonen opasti vierailijoita esperantoksi Valamon alueella; samantapaisen kierroksen kurssilaiset tekivät jo ensimmäisenä kurssipäivänä.

Kurssiviikon päätteeksi vierailijat, ulkomalaiset kurssilaiset ja opettajat lähtivät kohti Kuopion Arta Lumo -festivaalia. Matka sujui erinomaisessa kesäsäässä mukavasti sisävesiläivällä Heinäveden Karviosta Kuopion satamaan, jos-

sa matkaaajia odotti iloinen ryhmä festivaalilaisia.

Onnistuneen kurssiviikon jälkeen on mukava toivottaa tämänkertaiset, aikaisemmat ja uudet kurssilaiset tervetulleiksi Valamoon ja tietenkin myös Suomen Esperantoliiton muihin tapahtumiin. Ensi vuonna Valamon esperantokurssi järjestetään todennäköisesti kesäkuun lopulla. Kurssilla on myös mahdollista vieraila tämänvuotiseen tapaan.

Atilio on jälleen lupautunut pääopettajaksi ja tarvittaessa mukana on myös toinen päätoiminen opettaja. Tiina toimii jo totuttuun tapaan kurssivastaavana.

Tarkemmat tiedot vuoden 2008 kurssista kerrotaan liiton kotisivuilla www.esperanto.fi ja *E-ku*-kurssilistalla, Esperantolehdessä sekä liiton tapahtumien yhteydessä. Seuraa niitä ja tule sinäkin vaikkapa yhdessä ystäväsi kanssa kokemaan Valamon ihmeellinen ilmapiiri!

Tiina Oittinen

Argentiinalaisena Euroopassa – Argentinano en Eŭropo

Prelego de Atilio Orellana Rojas 21.7. en la ĉefbiblioteko de Turku

Antaŭ la kursosemajno en Valamo la ĉefinstruisto Atilio Orellana Rojas denove estis invitita al Turku de Esperanto-societo en Turku (EST). Vendrede li vizitis Muminvalon en Naantali kun grupo de aliaj esperantistoj el Espoo kaj Turku kaj el Nederlando, de kie venis Margreet Peschier survoje al Valamo.

La ĉefa aranĝo dum lia vizito estis publika prelego en la nova ĉefbiblioteko de Turku – en la jam konata salono Studio, kie ni aprile havis la plezuron aŭskulti prelegon de Renato Corsetti. Atilio parolis pri siaj spertoj kaj travivaĵoj, kiam li alvenis al Nederlando komence de 1990-jaroj. La titolo estis Argentinano en Eŭropo (finne: Argentiinalaisena Euroopassa). Krome li tuŝis diversajn antaŭjuĝojn, kiujn ni ĉiuj havas renkonte kun homoj de aliaj nacioj kaj aliaj kulturoj.

La prelegon lerte interpretis Jorma Ahomäki. Ĉeestis trideko da aŭskultantoj, inter ili 5-6 neesperantistoj, kiuj trovis la aranĝon i.a. pere de

surmuraj anoncoj en anonctabuloj ĉirkaŭ la urbo. Al amaskomunikiloj estis sendita gazetara komuniko kaj informoj al ”Kien iri?”-kolumnoj. En Turun Sanomat aperis eta artikolo pri la prelego kaj en lokaj radioj ĝi estis menciita kiel vizitinda evento.

La aŭskultantoj povis ĝui amuzan prelegon kun flua interpretado. Post ĝi ekestis demandoj, eĉ en la hispana. Ĝojigis nin en Turku vidi ankaŭ alilokajn esperantistojn el Espoo, Ylöjärvi kaj Stokholmo, kiuj tiucele venis al nia urbo. Ekestis vigla esperantlingva diskutado en la salono post la prelego kaj ĝin ni daŭrigis dum vespermanĝo surŝipe de unu el la famaj ŝiprestoracioj de Turku.

Ni en EST esperas havi novajn gekursanojn kaj eĉ membrojn helpe de la publikaj prelegoj. La aŭtuno montros kiel bone ni ĉi-foje sukcesis. Dankon ĉiokaze al niaj ambaŭ ĉi-jaraj prelegantoj, Renato kaj Atilio, kaj bonvenon denove!

Tiina Oittinen, prezidanto de EST

Oka kurso en Valamo

En unu semajno vastiĝas perceptoj

Landa esperanta asocio aranĝis nun okan fojon esperantokurson en la monaĥejo de Valamo. Kiel antaŭe, en la monato julio. Kaj kiel antaŭe, ĉefinstruisto estis Atilio, kiun konas ĉiuj, kiuj komprenas ĉi tiun tekston. Atilio rondiras profesie ĉirkaŭ la mondo, kaj estas bona afero, ke eblas al li ĉiun someron veni al Valamo.

Ĉi-foje partprenantoj estis dek du. Povus eĉ esti pli, tiel bona instruisto estas Atilio Orellana Rojas, kaj kun li kiel instruistino Tiina Oitti-

nen. Vere, indas pripensi jam nun partoprenon al venonta kurso. Mi rekomendas.

Familia nomo de Atilio Orellana Rojas signifas libere tradukita ”Malgranda Ruĝa Orelo”, ”Pieni Punakorva”. Atilio tion mem tradukis al ni. Ne, ne nomo viron malboniĝas. Estas klara afero, ke dum neplena kursosemajno ne eblas iri tra la tuta gramatiko. Sed en la kurso oni flikis grandajn truojn en gramatika reto.

La kurso havis du nivelojn, por progresantoj kaj malpli progresantoj. Atilio vizitis instruinta ĉe ambaŭ kursanoj kaj Tiina flikis, kion Atilio en urĝo ne atingis fari. La sistemo funkciis tre bone. En la kurso estis partoprenantoj enlandaj,

Ŝiauliai – urbo de katoj kaj multo cetera

Baltiaj Esperanto-Tagoj okazis nun la 43-an fojon. En la komenca periodo kunvenis inter-nacio de esperantistoj preskaŭ nur el sovetaĵ respublikoj. Nunaj BET estas vastaj; 322 homoj el 18 landoj, duono el Litovio, deko el Finnlando.

La bazo de la programo en BET estas kleriga, somera universitato kun kontribuoj de partoprenantoj. Interalie oni aŭdis pri la retaj aplikoj de esperanto, pri lingvaj temoj, pri tradukado; la finnlanda saŭno estis inter la temoj. Kultura

programo ofertis interalie altkvalitajn koncertojn de esperantaj kaj lokaj artistoj ĉiun vesperon, kaj turisma programo tuttagan kaj duontagajn ekskursojn.

La ejo, universitata domo, estis bona kaj taŭga, facile atingebla de la hosteloj en la centro, tamen iom distance – busveturo necesis. Enurbe oni renkontadis esperantistojn – multaj ĉefe dediĉigis al distro kaj turismo. Por turismi, la urbo ofertas multajn tre specialajn celojn, interalie simpatian muzeon pri – katoj.



En BET videblis ankaŭ litovaj naciaj dancoj.

kaj aldone du svedinoj kaj unu virino el Nederlando.

Estas travivaĵo pasigi semajnon en Valamo. Monaĥeja ĉirkaŭaĵo, tre bona manĝaĵo, silento. Nek televido nek radio nek gazetoj ĝenas tie kaj estas jam travivaĵo viziti ortodoksan meson. Mi proponas, venu mem al studo kaj vidu.

Osmo Kaplas

Okazis ankaŭ katolika meso esperante en la majesteca katedralo. Ĝi estis surprize interrompita de policisto, kiu eniris kaj laŭte ordonis formovi misparkumitan aŭton apudan (kiu fakte ne apartenis al iu ĉeestanto). La epizodo estis tiel skandaleca, ke ĉe la solena fermo alta polica oficiro prezentis publikan pardonpeton.

En Litovio esperanto ĝuas altan socian prestiĝon kaj BET, kiel niaj eventoj kutime, estis bone atentata de la amaskomunikiloj.

Tuomo Grundström

Spertoj de EAF-reprezentanto dum UK

Mi partoprenis la 92-an UK:n en Jokohamo kiel anstataŭanto de A-komitato de Esperanto-Asocio de Finnlando (A. Ritamäki) kaj estis ankaŭ la salutanto por Finnlando. Krome mi respondecis pri la tablo de EAF en la Movada Foiro, kiu okazis dum la interkona vespero.

Krom la komitatkunsidoj mi partoprenis kiel reprezentanto de EAF en subkomitatoj informado, edukado, landa agado kaj eksteraj rilatoj; kaj en kunsidoj de delegita reto kaj ĉefdelegitoj kaj perantoj. Mi ankaŭ ĉeestis en kunsidoj Patronoj de TEJO, ILEI kaj venontaj UK-oj.

Movada Foiro

La aranĝo okazis en la kongresa salono Hodler sabate 4.8. inter 18-20. Ĝi estis malfermita ankaŭ al la granda publiko. Krom landaj asocioj ĉeestis reprezentantoj de diversaj aliaj esperanto-organizoj, nombro de partoprenantoj estis pli ol 60. EAF dividis tablon kun Sveda Esperanto-Federacio kaj en nia alia flanko estis ĉinoj.

Sur la tablo de EAF estis por konatiĝo la libroj Muminvalo kaj Grafino kaj ŝia fantasta vivo, poŝtkartoj de Tampere UK'95 kaj franc-germana Heinävesi-prospekto. Disdonitaj estis la novaj turistprospektoj de Kuopio kaj la malnovaj de Turku (1994) kaj informpaperoj pri la Valamo-kurso. Afiŝo de Arta Lumo troviĝis en la antaŭa parto de tablo. La plej grandan intereson vekis la Muminvalo-libro, la figuroj ja estas tre konataj en Japanio. Mankis granda mapo de Finnlando, sed mi rekompensis ĝin montrante la etajn en la prospektoj. Sirkka Mattlin afable deĵoris kelktempe ĉe la tabulo, kiam mi vizitis la aliajn tablojn. Multegis la partoprenantoj en la salono, kio estis iom tro malgranda por la aranĝo tiel ke ne tre bone eblis konatiĝo kun ĉiuj tabloj. La ĝenerala bildo estis, ke ĉiuj disdonitaj prospektoj k.a. estis multkoloraj kaj plej ofte profesie faritaj; ankaŭ la afiŝoj estis informplenaj kaj multkoloraj. La etoso estis entuziasma, kvankam bruega.

Salutantaj vortoj:

Salutojn el la jubilanta Finnlando kaj koran dankon al ĉiuj kiuj gratulis nin okaze de 100-jariĝo de nia landa asocio. Vi estas ĉiam bonvenaj al Finnlando!

Komitato de UEA

La komitato kunvenis sabate, lunde kaj vendrede. Ĉeestis el Finnlando ankaŭ Jukka Pietiläinen kiel B-komitato.

Ĉar estis elekta jaro, multan tempon postulis diskuto kaj voĉdonado por elekti por UEA C-komitatojn, Estraron, Komitatajn Reviziantojn kaj Financan Komisionon. La elekta propono kaj rekomendo por ĉiuj postenoj venis de elekta komisiono.

La komitato elektis la sekvajn C-komitatojn: Paulo Antonio Branco Neves, Probal Daŝgupto, Loes Demmendaal, Jasuo Hori, Barbara Pietrzak, Philippe Chavignon, Julian Hernandez Angulo, Michela Lipari kaj Amri Wandel. Krome José F. Sole estis elektita kiel C-komitato por ke li povu reprezenti UEA en Unesco-kunsido en Lingva Pax instituto en Barcelona.

Elektitaj komitataj reviziantoj estis Paulo Antonio Branco Neves kaj Marcel Delforge kaj membroj de financa komisiono Helen Fantom-Prent kaj Flory Witdoekt.

La nova estraro: prezidanto Probal Daŝgupto, vicprezidantoj Ranieri Clerici (homaj kaj lingvaj rajtoj, plivastigo, modernigo, planado ktp) kaj Claude Nourmont (kulturo, kongresoj ktp), ĝenerala sekretario Barbara Pietrzak, estraranoj Loes Demmendaal (financoj), Hori Jasuo (landa agado, edukado, kulturo), José A. Vergara (strategio, lingvopolitiko, movada evoluo, sciencoj). Ambaŭ vicprezidantoj anstataŭas egale la prezidanton.

La komitatkunsidon estris Renato Corsetti ĝis la elekto de la nova estraro kaj poste li donis la taskon al Probal Daŝgupto.

Elektita estis ankaŭ konstanta komisiono pri statuto de novaj landaj kaj fakaj aferoj: Brian Moon, Ulrich Lins, Yves Bellefeuille. Nova landa asocio de Taĝikio estis akceptita al UEA.

Novaj honoraj membroj de UEA: Konisi Gaku kaj Endre Dudich. La regularo pri honorigoj estis modifita tiel ke nun eblas elekti krom Honoraj Membroj (HM) kaj Prezidantoj (HP) ankaŭ personoj, kiuj ricevu Diplomon pri Elstara Agado por Esperanto (mallonge DEA).

Jarraporto 2006 kaj buĝeto 2008 estis akceptitaj same precizigaj ŝanĝoj en la ekzamena regularo. La novan konsiston de Internacia Ekzamena Komisiono la komitato akceptis, ILEI ankoraŭ faros konfirman voĉdonon. Strategian laborplanon oni lasis al la estraro por plia formulado kaj diskuto pri funkciado de la komitato daŭrigos en la retlisto. – Cetere, la retlisto de la komitato estas publika por ĉiuj UEA-membroj, sed nur komitatanoj rajtas skribi al ĝi.

Elekta komisiono estos elektita en la komitatokunsido 2008. Jukka Pietiläinen kaj Yves Bellefeuille esprimis sian intereson partopreni en reviziado de elekta regularo.

Kongresa rezolucio

Fine de la kunsido la komitato rapide akceptis la kongresan rezolucion, kiu estis kiel kutime laŭtleĝita en la solena fermo kaj aperis en la kongresa kuriero. Ĝi aperos en la sekva revuo kaj jam estas en la reto, ankaŭ kun kelkaj alilingvaj tradukoj.

Delegita reto, ĉefdelegitoj kaj perantoj

La delegitoj (inkl. la ĉefdelegiton) estas elektitaj nuntempe por 3-jara periodo. Nun aŭtune estos tempo renomumi la ĉefdelegiton, venos letero pri tio de UEA. La ĉefdelegito trarigardas la landan delegitan reton kaj informas al UEA, ĉu ĉiuj daŭre estas sufiĉe aktivaj por daŭrigi la delegitan taskon. Peranto ne necesas esti sama persono kiel la ĉefdelegito. Kelkaj landoj eĉ havas plurajn perantojn.

UEA instigas ĉefdelegitojn kaj perantojn daŭre varbi novajn individuajn membrojn.

Kvankam la reta jarlibro bone funkcias kaj povas facile esti aktualigita, la papera libro daŭre aperos jare.

Venontaj UK-oj

Kiel vi roterdamas 2008? Tiun demandon faris la venontjara LKK-prezidanto Ans Bakker ten Hagen. Kongresejo estos World Trade Center. Al renovigita Centra Oficejo estos aranĝataj sufiĉe da ekskursoj por ke ĉiuj povos viziti ĝin. Aliaj ekskursoj estos diversaj ol 1988. IJK okazos laŭ nunaj planoj samtempe kiel parto de la UK.

Bjalistoko estos la kongresa urbo en Pollando 2009. La urbestro jam flue legas esperante, post du jaroj li promesis eĉ same flue paroli. Li aparte venis al Jokohamo por inviti esperantistojn kongresi en sia hejmurbo.

ILEI, edukado

En internaciaj ekzamenoj dum la UK partoprenis 3 personoj, kiuj ĉiuj sukcesis en la elementnivela ekzameno. ILEI volas kuraĝigi ĉiujn, kiuj volas ekzameni. La ekzamensistemon prizorgas la landaj asocioj.

Kajero "La Komuna Eŭropa Referenckadro pri instruaj kaj taksaj metodoj por la akiro de modernaj lingvoj" estis prezentitaj dum ILEI-kunsidoj kaj dum Tago de la lernejo. Temas pri gvidilo pri taksado de lingvo-akirado.

ILEI-kongresoj: 2007 en Ranzan, Japanio tuj post la UK (Marjo kaj Harri Laine partoprenis). 2008 en Benino, Afriko.

La partopreno en la UK estis denove travivaĵo. En "malgranda" 1900-persona kongreso renkontiĝo kun novaj kaj malnovaj geamikoj facile eblis. Kvankam grandan parton de mia tempo ĉi-foje prenis la oficialaj kunsidoj, mi ne bedaŭras tion, ĉar estis vere interese sekvi kiel funkcias nia komuna societo. Kompreneble mi ankaŭ povis bonege ĝui la kongresan etoson dum la vesperaj programoj, dum la ekskursaj tagoj kaj dum tempoj inter la kunsidoj.

Tiina Oittinen

Legu pli pri Japanio

HORI Jasuo: Raportoj el Japanio 10

Libroteko Tokio, 2007

184 paĝoj, prezo 11,2 eŭroj

mendebila ĉe hori-zonto@water.sannet.ne.jp

Aperis jam la deka kolekto de raportoj el Japanio. En la unuaj la aŭtoro malofte montris siajn opiniojn pri la aferoj, kiujn li pritraktis, dezirante nur plialtigi sian lingvan kapablon kaj konatigi Japanion al esperantistoj. En la nuna kolekto li pli malferme skribas de sia propra vidpunkto. Kvankam kelkaj aferoj en Japanio iĝis malagrablaj por li, li ĉiam esperas pacon kaj interkompreniĝon, defendas la homecon.

Inter la temoj de Hori ofte videblas socio, edukado, politiko, sed ankaŭ ĉiutaga vivo, geogra-

fio, klimato kaj pasintaĵoj japanaj. Liajn eseetojn li ilustras per desegnaĵoj, fotoj, mapetoj kaj statistiko. Sian libron li finas per la esperanta traduko de la kanto Paco Naŭ, kiu naskiĝis en la movado kontraŭ la ŝanĝo de la 9a artikolo de la japana konstitucio. Tiu artikolo ĝis nun malpermesis al japanoj militon kaj tiel helpis al ekonomia evoluo kaj riĉiĝo de Japanio post la 2a mondmilito.

Jen kelkaj aliaj temoj el la 10a kolekto: manĝobastonetoj kompare kun forkoj kaj tranĉiloj, viktimoj kaj kaŭzoj de Minamata-malsano, beboj fordonitaj de anonimaj patrinoj, vizito al eksa sanatorio de lepruloj, postdrinka stirado. La legaĵoj estas ne longaj kaj la lingvo estas normala Esperanto senerara.

Saliko

Interkultura serio ... Tra la Mondo

En la serio aperis jam du volumoj, la unua *Monatoj tra la Mondo* kaj la dua *Vivoj tra la Mondo**, kiu enhavas kvazaŭ leterojn el diversaj eŭropaj kaj aziaj landoj kaj ankaŭ du leterojn el Afriko. Ili rakontas pri la vivo kaj moroj de homoj en la landoj de la raportistoj ekde naskiĝo kaj infanaĝo ĝis plenkreskuliĝo, laborvivo, geedziĝo, emeritiĝo, maljuneco, morto kaj espero pri postmorta vivo.

La nivelo de la lingvo varias laŭ ĉiu raportisto. La kompilinto de la libro, s-ro HORI Jasuo el Japanio, ne multe korektis, nur la plej evidentajn lingvajn erarojn li ĝustigis. Li ankaŭ aldonis Antaŭparolon kaj kelkajn fotojn el la koncernataj landoj kaj kulturoj. En la finon li metis sian esperantan tradukon de la poemo de s-ino M. E. Frye "Ne staru ĉe mia tombo, ne ploru... Mi ne estas tie. Mi ne mortas", kies finnan version ni ne malofte vidas ankaŭ en Finnlando en anoncoj pri morto.

Ĉe la adreso cxenraporto@yahoogroups.jp s-ro Hori daŭre kolektas pliajn leterojn, ekzemple pri muziko kaj arto, lingvoj, eksterlandaj lingvoj en lernejo, historio, politiko, nuna plej grava socia afero. La serio montras al ni grandajn kulturajn diferencojn kaj ĉiutagajn malsamaĵojn. Ĉu ni interkulturigi?


Saliko

**Vivoj tra la Mondo; la unua eldono la 25an de julio 2007*

*Aŭtoroj:
Membroj de
"Ĉenraportoj"*

*Redaktisto:
HORI Jasuo
Eldonejo:
HORIZONTO*

*Prezo:
1000 enoj
(6,7 eŭroj,
8,4 usonaj
dolaroj)*



EEU kongresos pli ofte

La 7an European Esperanto-Kongreson en Mariburgo de Slovenio (29 jul ĝis 3 aŭg) aliĝis tricento da personoj el tridek du landoj. Venis skribaj salutoj de kelkaj ambasadoroj, sed mankis la saluto de UEA. Fakte, dum UEA-estrarano ĉeestis la SAT-kongreson ĵus en Parizo, neniun estrarano ĉeestis tiun de Eŭropa Esperanto-Unio.

Ekde nun ĉiun duan jaron okazos la Europa Esperanto-Kongreso, kaj venontfoje en Herzberg (Germanio), la sola urbo kiu invitis (kvankam neniun hercbergano ĉeestas en Mariburgo). Jen la plej grava decido de la Asembleo de EEU, konsistanta el la delegitoj de la landaj asocioj.

Finance EEU estas ekvilibra, kun dekmilo da eŭroj minuse kaj sama dekmilo pluse, el kiuj duono el donaco de japana mecenato: oni povas diri ke, sen Japanio, Eŭropo riskus droni... Tamen ĉi-jare Eŭropa Unio (tra la programo "Eŭropo por civitanoj") subvenciis la kongreson per 24 000 eŭroj, el kiuj iomo restos kiel profito por EEU. Inter la elspezoj 2006 estas menciindaj la kostoj pro la honorarioj de du kunlaborantoj (kiuj produktis European Bultenon), pro la lumdisko "Esperanto elektronike" disdonita al EU-parlamentanoj, kaj pro la produktado de la filmo "Kia povus esti Eŭropo".

Strategian demandon levis nur la UFE-delegito, Alex Kadar, pri la rilatoj inter EEU kaj UEA. Laŭ respondo de Zlatko Tišljarić, sekretario, EEU transprenis taskojn kiel la preparon de afiŝo okaze de la Lingvo-Tago (26a de septembro), sed ĝi estas nek eŭropa komisiono de UEA nek eŭropisma faka asocio de UEA. Neniun rimarkis ke en UEA la EU-agado estas skeptike konsiderata.

(el HeKo redaktis mm)

◁ *Börje Eriksson skribis pri handikapuloj en "Vivoj tra la mondo" kiu aperis en julio 2007. En la libro aperas lia familio fotita de Katja Nuorvala en majo dum la Eŭropa kantofestivalo.*

Infana kongreseto okazis en Herzberg

Jam la duan fojon ripetiĝis la dulanda Somera Arbara Lernejo (Salo), kiu ĉiujare kunigas dum duona monato Esperanto-lernantajn infanojn inter 12 kaj 16 jaroj el la ĝemelurboj Góra (Pollando) kaj Herzberg – la Esperanto-urbo (Germanio). Dum la kunrestado de la 28-a de julio ĝis la 11-a de aŭgusto ili interrilatis en la internacia lingvo en amika internacia etoso sub la gvido de geinstruistoj.

En siaj artikoloj la gazetaro emfazis, ke la ĉi-jara aranĝo karakteriziĝis per elstare riĉa programo prizorgita de la loka esperanta Interkultura Centro. Fakte, la infanoj estis dorlotitaj: ili amuziĝis en glitejo kaj naĝejo, lernis arkopafi, dancis diverslandajn popoldancojn, vizitis bestoparkon, esploris groton, ekskursis al turismaj lokoj, publike koncertis en Esperanto kaj migradis en arbaro. Ne mankis, kompreneble, instrua parto, konsistanta el praktikado de la lingvo kaj fina ekzameno. La partopreno en la renkontiĝo estis senpaga, ĉar ĉiuj kostoj estis kovritaj de la du urboj, la Pol-Germana Junulara Fondaĵo kaj privataj sponsoroj.

Tre impresa estis la favoro de la urbestro, Gerhard Walter, kiu oficiale akceptis kaj regalis la gepartoprenantojn en la urbodomo, persone gvidis tablotenis turneon (kaj eĉ ludis en ĝi kun la infanoj), disdonis pokalojn kaj donacojn, prezidis diversajn publikajn aranĝojn kaj plurfoje vizitis la kunvenojn.

*Germana Esperanto-Centro/
Interkultura Centro Herzberg
<http://ic-herzberg.de>*

✉ Korespondi deziras

Oleg Dengaĉjov, Svetlanovskij avenuo 109-1-314, 195297 Sankt-Peterburg, Rusio

Profesio: "Development" en konstruo
Interesoj: Numizmatiko, vojaĝoj, arĥitekturo
Aĝo: 40 jaroj

10a Internacia Fotokonkurso

Post naŭ sukcesaj konkursoj (1998–2006) la redakcio de “La Ondo de Esperanto” invitas al partopreno en la deka Internacia Fotokonkurso. Rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15×20 cm. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 1a de decembro 2007, kaj esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo, poŝta adreso kaj retadreso (se estas) de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton. Ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

Juĝkomisiono aljuĝos premiojn, monajn kaj abonojn de Lode. La rezulto estos anoncita en LOde. La organizanto de la konkurso havos ĝis la 31a de decembro 2009 ekskluzivan rajton uzi la ricevitaĵajn fotojn. Poste la publikigo-rajton havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj.

Legu pli: <http://www.esperanto.org/Ondo/Ind-fk.htm>

*sekretario de la konkurso Halina Gorecka
RU-236039 Kaliningrad,
ab. ja. 1205, Ruslando*

Oceania Kongreso en Nov- Zelando en januaro 2008

La ‘Oceania Kongreso’ okazos en Auckland, la plej granda urbo de Nov-Zelando, ekde la 14-a de januaro ĝis la 23-a de januaro 2008. Okazos kursoj, ekskursoj, distraĵaj vesperoj, debatoj, bankedo, teatraĵoj ktp.

La kongresejo (kun surloka loĝado) situas inter la internacia flughaveno kaj la urbcentro de Auckland. Kotizoj estas ekde 425 eŭroj por loĝado, manĝoj, kaj partopreno en la programo kaj kursoj. Pliaj informoj kaj aliĝilo videblas ĉe www.esperanto.org.nz.

Jarlibro 2007 aperis

Kun 1733 adresoj en 102 landoj la Jarlibro havas 56 delegitojn malpli kaj 3 landojn pli ol pasintjare. Estas 53 ĉefdelegitoj, 976 lokaj delegitoj, 118 vicdelegitoj, 39 junularaj kaj 1295 fakaj delegitoj en preskaŭ 800 fakoj. Krome en Brazilo estas 5 regionaj delegitoj. La nombro de kontakt-informoj pri lokaj kluboj restas sama kiel pasintjare, 81 en 28 landoj.

En la unua parto de la Jarlibro aperas adresoj k.a. informoj pri la organoj, instancoj kaj servoj de UEA kaj TEJO, pri landaj kaj fakaj asocioj, Akademio de Esperanto, edukaj kaj kulturaj organizaĵoj, bibliotekoj, ktp. Tie legeblas ankaŭ la Esperanto-rezolucioj de Unesko kaj la Gvidlinioj por informado de UEA. La Jarlibro enhavas ankaŭ anoncojn kaj rabatkuponon de la Libroservo de UEA.

Individuaj membroj de UEA povas profiti de la informa trezoro de la Jarlibro ankaŭ rete. Krom facila uzebleco por rapida serĉo de delegitoj k.a. informoj, avantaĝo de la reta Jarlibro estas ĝia ĝisdateco. Por ekuzi la servon necesas registriĝi ĉe <http://reto.uea.org>, alirebla ankaŭ per la ligilo “Jarlibro” sur la startpaĝo de www.uea.org. (el komuniko de UEA koncizigis mm)

Klasikaĵo denove havebla

Unu el la plej famaj Esperanto-libroj, “Vivo de Zamenhof”, estas denove havebla. Sojle de la Jokohama UK aperis ĉe UEA la sesa eldono de tiu ĉi verko, unue eldonita en 1920, verkita de la juna sviso Edmond Privat (1889-1962).

La libro de Privat jam delonge estas konsiderata klasikaĵo. Aperis de ĝi tradukoj en ok naciajn lingvojn. La nunan eldonon redaktis Ulrich Lins, kaj zorge kontrolis citaĵojn el paroladoj kaj verkoj de Zamenhof. En la ampleksaj notoj troviĝas font-indikoj kaj aldonaj klarigoj. La nova eldono estas ilustrita ankaŭ per multaj malpli konataj fotoj. Sekve la libro ne estas nur reeldono sed posedas tute novan kvaliton.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Novtipaj ekzamenoj por Esperanto

Konforme al la novaj lingvotestaj normoj de la Konsilio de Eŭropo la ekzamena laborgrupo de UEA kaj ILEI estas ellaboranta novan ekzamensistemon, kiu ebligas al la esperantistaro trapasi internaciajn ekzamenojn je tri niveloj A, B kaj C. La novtipajn atestojn pri lingvokono pli kaj pli ofte jam postulas dungantoj kaj edukinstitutoj ne nur en Eŭropo sed ankaŭ en multaj aliaj landoj de la mondo. La ekuzo de unueca normaro ankaŭ en Esperanto-ekzamenoj ebligas taksi lingvajn lertojn laŭ samaj kriterioj en kaj ekster Esperantujo, kompare kun ajna nacia lingvo. (Pli da informoj troviĝas en la sekcio Referenc-kadro en www.edukado.net.)

La testado de la novtipaj ekzamenoj finiĝos en tiu ĉi jaro kaj la nova ekzamensistemo povos ekfunkcii en 2008. En la unua periodo tiaj ekza-

menoj estos organizataj de du eŭropaj centroj, kiuj poste trejnos kaj rajtigos ekzamenantojn kaj organizos ekzamensesiojn ankaŭ aliloke. La malnovaj ekzamenoj de UEA-ILEI dume plu estos okazigataj laŭ la malnova strukturo, t.e. en du niveloj. Estas konsilinde trapasi ilin, kiam oni bezonas atestilon por propra celo aŭ nur ene de la movado.

